# *Raúl Castro akceptis la prezidanton de la komerca ?ambro de Usono.*



Havano, 14 jan (RHK) La kuba prezidento Raúl Castro akceptis ?i-vendrede en Havano, la sinjoron Thomas J. Donohue, prezidanto de la komerca ?ambro usona, kiu vizitas la insulon. Dum la renkonti?o ili dialogis pri temoj de reciproka intereso.

Akompanis la sinjoron Donohue, la sinjorino Jodi Hanson Bond, vicprezidanto por la Amerikoj de la komerca ?ambro, kaj la sinjoro Maurice Greenberg, prezidanto de la asekura kompanio STARR.

Flanke de Kubo partoprenis Rodrigo Malmierca, ministro pri ekstera komerco kaj fremdaj investoj kaj Josefina Vidal, ?enerala direktoro por Usono, de la ministerio pri eksteraj rilatoj.

Anta?e la sinjoro Donohue kaj liaj akompanantoj estis akceptitaj de Ricardo Cabrisas, vicprezidanto de la ministra konsilantaro kaj ministro pri ekonomio kaj planado, samkiel Rodrigo Malmierca kaj Lina Pedraza, ministroj pri ekstera komerco kaj financoj, respektive.

La renkonti?o ?e la ministerio pri financoj kaj prezoj kun la reprezentantoj de la komerca ?ambro usona iniciatas la esploron de eblecoj por kunlabori en la dezajno kaj komercado de produkoj asekuraj kaj voja?-asistado.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/118404-raul-castro-akceptis-la-prezidanton-de-la-komerca-cambro-de-usono

# Radio Habana Cuba